

Lingvo Internacia

Duonmonata organo en Esperanto

Redakcio kaj administracio **PARIS**, 5-e Arr., 33, rue Lacépède, 33

I novembro 1906

G. Kolowrat. — Ĉu Esperanto estas romana?	581
Miksaĵoj: Pia kaj praktika lando, — Alphonse Karr. — Malico de Ministro. — Diversaj notoj. — Delikata riproĉo	592

Tra la mondo esperantista :

D-ro Vallienne. — En Esperanto estas du lingvoj	596
E. Ĉefeĉ. — La trouzado de la kunmetitaj tempoj	60
Bibliografio	6
Pri « Panroman » (de BORISO KOTZIN)	ne-
Projekto (de ROMANO FRENKEL)	a por

Nia aldono literatura (paĝoj 321—336) : **La fumo**, de MRYA K. ONOPJE kaj (trad. VLAD. SVIDEREK), **daŭrigo kaj fino** kaj **La Sekreto de Masistro** kaj **vor-nilio**, de A. DAUDET (trad. L. TOUCHEBEUF).

Ĉu Esperanto estas romana

Ho, kiel oni persistas en siaj eraroj! Oni (eĉ (santr, ĉentro). aĵoj) ofte opinias, ke Esperanto estas romana! Ĉi ĝi partiecon, oni blinde anoncas, ke ĝi estas pli plingve.) manlingvanoj aŭ, almenaŭ, konstatante, ke ĉiuj ĝi estas fonetika pene lernas ĝin, oni kvazaŭ konsideras tion ĉi kiel Es- kiel neklarigeblaĵon kaj iafoje penas eviti la d (rusi = rusi); oni « romaneco », pasante al alia temo. Ĉu ni v. Aleksandr (ne Alex- respondi al niaj kontraŭuloj, ĉu vere la eggerm. Quartier). Frem- indaĵo, ĉu la romanuloj estas privilegiitaj? kiel Esperante ĝendarmo, ni trapaŝu tra ĉeno da lingvoj — anĵ slave, la vokaloj en Esper- komparu kun ili Esperanton. o), sed la konsonantaro estas ĉre

Oni blinde opinias, ke Espprezenti sonojn ĉ + kons.; germane naj kun francaj ol kur pane z). gla kombinoj de literoj estas pli slavaj ol ranto-anglan ver pane z). gla kombinoj de literoj estas pli slavaj ol en ambaŭ li, ne kŭ (kiel germane), k (france); gv, ne gŭ, g; cio, anglo, c on (= sion) aŭ tion. La finaĵoj en delfeno, arlekeno, para- lelas al rusj en maneken (fr. mannequin), buleten (fr. bulletin),

anto havas multe da germanaj radikoj. Eĉ la rusa lingvo, kiu unuavide ŝajnas havi nenion komunan kun Esperanto krom tri-dekon da vortoj (ĉerpi, prava, krom, kolbaso, klopodi, brovo, gladi, nepre, nu, ope, kranio, svati, kruta, barakti... domo, ne, vidi, sidi, juna, nova, tri, vi, nun... celo, flago, rimeno, roto kaj aliaj), laŭ mia komparo, entenas en la Universala Vortaro, kie ne estas internaciaj vortoj (vagono, nacio, kartono, episkopo, telegrafo, ktp.), preskaŭ 40 % da vortoj, kies radikoj kuŝas en tute rusiĝintaj vortoj (kvar en kvartet, aŭdi en auditoria, fino en final, kandelo en kandelabr, justa en justicia, juvelo en juvelir, kredi en kredit, konservi en konservy, mono en moneta, peti en peticia, regula en regularni ktp., ktp.) Simila komparo ortaj estas farebla por germanoj.

Grekaj konas ne multe malpli da Esperantaj radikoj ol (ne forĝas grekajn vortojn kiel *kaj, dek, mezo, sono, en, oĝo, pri, plej, ajn, miksi, orfo, klini, horo, vidi, horo, kombi, kisi, patro, aero, sabato, asparago, verki* kaj multaj aliecipe se oni konsideras, ke multaj grekaj vortoj inter-Tiaj lastaj vortoj estas ekz. atomo, geografio, teatro, centro, katastrofo, poezio, frazo, dramo, ideo, idioto, limato, sintakso, ateisto, epiteto, karaktero kaj mul-

Hungara lingvo, permesu al mi citi alifamilian lingvon, certe malpli da komunaj kun Esperanto radikoj ol eĉ germana, slavaj, greka, ĉar ĝi evitas internaciajn vortojn, tamen nombro atingas centon; tiaj estas ekz. *czél* (elp. cel), *kolbász* (elp. kolbas), *kréta*, *posta* (elp. poŝta), *papir*, *vers*, *skatulya*, *tea*, *témo*, *kupola* ktp., ktp.

re, se ni konsideros la afiksojn, kiuj prezentas en inter gramatiko kaj vortaro, ni vidos, ke ne konataj eĉ de germanoj, slavoj, ekz. *ger-* *ve* (Geschwister), *in* (Gräfin), *ej* (Bäcker), *il* (Bürgermeister), *il* (Schlüssel), *et* (utheraner), *re* (Reaction), *aĵ* (Pas- ren); ruse *dis* (disonans), *re* (re-), *el* (ekskorol), *an* (goroĵ- r (poĉtmeister, il (kadilo, ŝa),

nj (Manja) — tiu ĉi fakto tute liberigas de speciala memorado de l'nomitaj afiksoj, ĉar ili antaŭestas en ĉiu slava kapo. La sufiksoj ej kaj id, ist kaj ism estas grekaj (διδασκαλεῖον, ἄρτοκοπεῖον, Ἀτρείδης, — θειστός, θεισμός — lernejo, panbakejo, Atrido, deisto, deismo).

Sed mi tute ne opinius mian ideon pruvita, se nedisputebla fakto ĝin ne apogus, kiun ne rimarkas la parolantoj pri la romaneco de Esperanto. La *gramatiko* kaj la *konstruo* de Esperanto ĉiuokaze estas pli germana ol franca, pli slava ol germana. Por ke tio ne restu vanaj vortoj, mi donos ekzemplojn.

ORTOGRAFIO KAJ ELPAROLO.

Esperanto havas el neakcentitaj literoj nur *z* kaj *v* kun negermana elparolo. En slavaj la elparolo estas tute Esperanta por ĉiuj neakcentitaj literoj kaj por akcentitaj *ĉ*, *ŝ* (nur slave kaj turke ekzistas tiaj *sursignitaj* literoj). Ankaŭ, la internaciaj vortoj en Esperanto mienas kaj elparoliĝas pli germane ol france, itale; ankoraŭ pli slave.

Ekz. doktoro = germane Doctor, slave Doktor, france docteur, itale dottore.

Gimnastiko = gimnastik, gimnastika, gymnastique, ginnastica.

Centro = Centrum, centr, centre, centro (santr, ĉentro).

Punkto = Punkt, punkt, point, punto.

(La konsonanta kuniĝo estas evitata romanlingve.)

L'ortografio en slavaj (kaj hungara) lingvoj estas fonetika (serbe, boheme en pleja grado). Oni ĉiam elparolas *co* kiel Esperante (ne kiel *ko*), slave *s* ĉiam kiel *s* (kroate rusi = rusi); oni skribas muzika (ne musica), klas (ne class), Aleksandr (ne Alexander), cenzura (ne censura); kvartira (germ. Quartier). Fremdaj vortoj toleras ortografian ŝanĝon, kiel Esperante ĝendarmo, abajuro, ŝalo, punĉo). Egale, kiel slave, la vokaloj en Esperanto ne hava nuancojn (au, ä, ö), sed la konsonantaro estas ĉre riĉa (dum itale oni ne povas prezenti sonojn *ĉ* + kons.; germane *ĵ*; france *h*; hispane *z*). La kombinoj de literoj estas pli slavaj ol iaj ajn; kv, ne kŭ (kiel germane), k (france); gv, ne gŭ, g; cio, ne cion (= sion) aŭ tion. La finaĵoj en delfeno, arlekeno, paralelas al rusaj en maneken (fr. mannequin), buleten (fr. bulletin),

velenevij (fr. de velin); Esperantaj *oj* en fojo, vojo (fr. fũa, vũa) estas same skribataj kaj elparolataj, ekz. ruse en konvoj, foje, loyalni, vojaĵ (fr. convoi, foyer, loyal, voyage kun sono ŭa). La fina *aŭ* estas germana (ankaŭ; Breslau).

Neniu popolo havas tiajn malfacilaĵojn por l'akcento kiel francoj. Plie, en Esperanto ĝi estas precize sama kiel *pole* (sur antaŭlasta silabo.)

ARTIKOLO. SEKSOJ. PAROLPARTOJ.

Kiel en angla, same en hungara lingvo, ekzistas nek ŝanĝo de l'artikolo nek gramatikaj seksoj. Ankaŭ, la seksoj ne estas konataj de l'turka kaj la sendifina artikolo en antikva greka.

La neromanaj lingvoj multe pli uzas adjektivojn kaj adverbojn ol la romanaj, kio proksimigas ilin al Esperanto en kies spirito ankaŭ kuŝas tiu uzo. Kaj ju pli la lingvo orientiĝas (kaj sekve ju malpli ĝi havas da komunajoj en la vortaro), des pli ĝi amas adjektivojn kaj adverbojn. Ni prenu unue anglan lingvon.

ŝtelista	thievish	<i>de</i> voleur
fizika	physical	<i>de</i> physique
insiste	perseveringly	<i>avec</i> persévérance
intence	purposely	<i>avec</i> intention
fripone	knavishly	<i>en</i> fripon

Simile, angla lingvo preferas adjektivo-similajn antaŭstarantajn substantivojn, kiel en paper ornament (papera ornamo, ornement en papier), man's cloths (viraj vestoj, vêtements d'homme.) Germane, ni diris, tiaj adjektivoj kaj adverboj estas pli oftaj, ekz. hiesig (ĉi-tiea — d'ici), eisern (fera — en fer), schriftlich (skribe — par écrit), brieflich (letere — par lettre), vorig (antaŭa — précédent), ktp. En slavaj ankoraŭ pli: postelni (lita), Petrov (Petra), bumajni (papera), makedonski (macedona), interesni (interesa), skritno (kaŝe) nuĵni (bezona), socialistiĉeski (socialista), pofrancuzski (france). Simile grekaj βοηθητικός, υπεροπτικός, χρυσός, κρύβδην (helpa, malestime, ora, kaŝe), hungaraj aranyos, tegnap, sokféle, azérti (ora, hieraŭa, multspeca, tiala), turkaj gegelik, bugünli, türkçe (nokta, hodiaŭa, turke).*

Germane kaj slave oni distingas parolpartojn pli klare,

dum france ekz. critique signifas kritiko, kritika, kritikás, kritiku, kritikisto.

Rimarku, ke tiu uzemo akcelas radikŝparon kaj en Esperanto kaj, ekzemple, germane: helpa — hilfs (fr. auxiliaire), vire — männlich (fr. virilement), buŝa — mündlich (fr. oral), nokta — nächtlich (fr nocturne).

La adjektiva formo en l'esprimo interesno ĉto (estas interese ke...), teplo (estas varme) kunfalas kun l'adverba kaj por ruso tio ŝajnas neniom embarasa.

En ĉiuj neromanaj lingvoj, same kiel en Esperanto, la adjektivoj staras antaŭ la nomo, kio donas apartan karakteron al la ekstero de la lingvo.

	<i>neromanaj lingvoj</i>	<i>romanaj lingvoj</i>
angla lingvo	english language	langue anglaise
ilustrita karto	illustrierte Karte	cartolina illustrata
verda arbo	zelonoje derevo	árbol verde
internacia societo	nemzetközi egyesület	societate internațională
turka imperio.	osmanli memleketi	imperio turco
pasinta jaro	περασμένον έτος	été passé

AKUZATIVO.

Oni scias, ke l'akuzativo malfaciligas iom la lernadon de Esperanto por romanidoj. Ĝi ankoraŭ ne ekzistas eĉ ĉe angloj, sed jen aperas en la tria konsiderata de ni lingvo, en germana. Germanoj ne bezonas tiom da klarigoj por ĝi kaj ne renkontas barojn en ĝia uzado, kiel tiuj nacioj. Tial li facile diras *la princon*, kiel *den Prinzen*, *ĉiun tagon* kiel *jeden Tag*, *tien* — *dorthin*, *antaŭen* — *vorwärts*; li diras eĉ *gib mir Brod* tute kiel *donu al mi panon* (fr. *du pain*). Vi vidas ankaŭ, ke la finaĵo de l'akuzativo estas sama en ambaŭ lingvoj (*den Knaben*, *Namen* — *la knabon*, *nomon*.) En slavaj lingvoj ĝi estas distingata de l'nominativo pli ofte ol germane. Ĝia neuzo en la frazo *igi kurba, opinii interesa, trovi vinon bona*, konformas al la rusa *delat krimim, scitat intresnim, najti vino horosim*, (bonan vinon — horoshe vino); oni uzas slave la saman kazon en du frazoj *nomi Petro* kaj *esti nomata Petro*. Tiu « nominativo de klareco » prezentas do nenian malfacilaĵon, kiel, ekz., al francoj.

En greka l'akuzativo samformas kun la nominativo eĉ

nur en neŭtra sekso. Ĝia finaĵo estas precize sama kiel en Esperanto (χώραν, καλόν, ἔριν, ἀναγκαῖαν, βίβλον; la sonoj ajn, ojn, estas ankaŭ grekaj — μούσαιν ἀγγέλοιν).

Okazkaptante, ni rimarku, ke la multnombro estas greke kutime je *j*. (κατάλογοι, ἀναγκαῖαι βίβλοι).

La simileco en l'uzado de akuzativo atingas plej *supran* punkton ĉe hungaroj kaj turkoj: 1) *ĉiuj* nomoj alprenas la finaĵon, 2) *ĝi* estas sama por ĉiuj nomoj eĉ en ambaŭ nombroj (h. ember — embert — emberek — embereket — kit [= kiun] homo — homon — homoj — homojn; diŝ — diŝi — diŝler — diŝleri...)

TEMPOJ.

Angla lingvo (kaj *ĝi* sola) havas preskaŭ senŝanĝajn tempojn (I have, we have, they have, I slept, he slept.) Germanfamiliaj lingvoj ne havas tiom da nuancoj en sia verba temparo, kiom romanoj (passé défini, passé antérieur.) Ankaŭ ofte oni tradukas per la sama angla formo I came (mi venis) aŭ germana ich kam la francan je vins, je suis venu, je venais.

En Esperanto, kiel en slavaj (kaj hungara) lingvoj, oni *ne* uzas malsimplajn tempojn kaj tial la verbaj tempoj estas nur tri. Sed, se oni bezonas precizigi la ideon, oni diras Esperante: estas vidinta, estus leginta... tiu formo paralelas al slavaj dal jest (antikva rusa), ĉitao bih (serba), videli sme (bulgara), miat byt, bede czynil (pola), kiuj estas kombinataj kun la verbo *esti* (neniam kun *havi*). Simile oni povas traduki nuance la anglan *I was writing per mi estis skribanta.*

MODOJ.

Germane oni metas indikativon post *sola, plej, lasta, antaŭ, ĝis* (fr. avant qu'il ne vienne), angle ankaŭ post verboj de dubo, timo, neo ktp. (it. temo che venga). Germane la tempo de l'ĉefa propozicio ne influas tiun de la neĉefa, ekz. er fragte, was er wolle, ich glaubte dass du kommen werdest (fr. je croyais que tu viendrais).

La slavaj kaj hungara diras kiel Esperanto: li dubas

ke mi venos ; mi esperis ke li sendos ĝin, mi pensis, ke tio estas finita ; li timis ke ŝi mortos, se li dormus.

Antaŭ infinitivo oni metas *nek* slave nek Esperante prepozicion (france de, à, germane zu, angle to, hispane a ktp.), ekz. ami labori (voleti raditi), estas necese lerni (nuzno uczić sie), deziro kanti (ĵelanije pet). Ankaŭ en antikva greka πειρώμαι εἰπεῖν (mi penas diri), hungare látni engedni (permesi vidi) turke ĝitmek istemem (mi ne volas iri). Oni diras analogie gorod Moskva (urbo Moskvo, germ. Stadt Moskau, fr. ville de Moscou), ime Maria (nomo Mario, dum angle the name of Maria). Sed eĉ angloj diras *nothing more* (nenio plu, fr. rien de plus, it. niente di più), odd way (stranga maniero, fr. drôle de façon).

Nek slave aŭ greke, nek hungare aŭ turke oni maldistingas l'aktivan kaj mezan formojn, ekz. pendĉ kaj pendigi — (viset kaj veŝat — fr. pendre), finiĝi (konĉatsa hisp. terminar), komenciĝas (hung. kezdődik, germ. anfängen), turniĝas (περιτρέφεται, angl. turns), turni (turke döndürmek, fr. tourner.)

PARTICIPOJ.

En la romanaj kaj germanaj lingvoj ekzistas nur du participoj (aktiva — estanta kaj pasiva — estinta). Tial' letto (itale) sigifas legata kaj legita, built (angle) konstruata kaj konstruita; tial ankaŭ oni uzas iafoje pasivan formon aktive (venuto, gewesen, descendu). En slavaj ili estas almenaŭ kvar: ĉitajuŝĉi (leganta), ĉitavŝi (leginta), ĉitajemi (legata), ĉitani (legita); suŝĉi (estanta), bivŝi (estinta), buduŝĉi (estonta), razumeo (kompreninta) ktp.; la slavoj do ne renkontas embarason de participo sentatan de la german- kaj romanlingvanoj.

Sed la greka superas la slavajn pri simileco kun Esperanto en tiu punkto. Ili estas ses (kiel Esperante), ekz. κρύπτων (kaŝanta), κρύψας (kaŝinta), κρύψων (kaŝonta), κρυπτόμενος (kaŝata), κρυφθείς (kaŝita), κρυφθησόμενος (kaŝota). La signoj ont, it, estas ja ankaŭ grekaj (τιμώντος, τιμητός — Reichline kaj nune — timitós). En turka ekzistas ankaŭ ĉiuj participoj paralelaj al la Esperantaj.

La slavoj — ankaŭ la grekoj, la hungaroj ktp.) — preferas participon al aparta substantivo, ekzemple en ĝulaĵuŝĉi (promenanto, fr. promeneur), tancujuŝĉi (dancanta,

germ. Tänzer) kaj (iafoje germanoj) ofte uzas la participon, kiel Esperantistoj, tie, kie, francoj uzas *que*, ekz. *homoj vidintaj tiun misteron, la libro enhavanta multajn ilustraĵojn, renkontita de mi tie*. La participojn en tiuj lingvoj oni uzas, kiel Esperante nur rilatigante ilin al la subjekto de l'ĉefa propozicio, dum francoj diras « l'heure étant avancée je... » (kun la senco : *ĉar* la horo ... mi ...), la séance terminée, il ... (*kiam* la kunsido finiĝis, li...), angloj « it having rained, nobody... » (*ĉar* pluvis, neniuj ...) Esperante oni diras kiel ruse aŭ hungare: mi vidis princinon *kun* vangoj malsekaj (fr. une princesse, les joues humides ...)

Slave, hungare, turke ekzistas specialaj *adverboj*—*participoj* kiel skribinte, (neniam « post esti skribinta, ») kiel romane), pensante, frapite, okazonte.

Tiaj formoj kun *ne* anstataŭas, kiel internacie, la francan *sans* (sen), germanan *ohne* ktp. ekz. ne vidante — ne vidja, sans voir, ne lerninte, ne demandite...; greke οὐ παίζων — ne ludante, hung. nem dolgozván. — ne laborante.

PRONOMOJ.

Slave, greke, hungare, turke la *senpersonaj* verboj ne postulas antaŭ si pronomon (ne kiel france, angle, germane). Morozit (ruse) — frostas, je ladno (kroate) — estas malvarme, ŝet — pluvas, villámlik (hungare) — fulmas, syĝak (turke) — estas varme. Estas egale antaŭ verboj havantaj alian logikan subjekton (amuzas min rigardi, estas necese malkaŝi, estis minutoj kiam ... venas homoj.)

En tiuj ĉi lingvoj la pronomaj tabeloj iom pli similas la Esperantan ol en romanaj, ekz. angle where — there, when — then, what, — that; anybody — nobody, — anything — nothing. Sed veran matematikan karakteron ĝi havas greke (*), hungare kaj turke — tie ĝi ŝajnas kvazaŭ elpensita, kiel en Esperanto.

Angloj, pli germanoj, ankoraŭ pli slavoj ktp. facile distingas la formojn (kio, kion, kiun, kiujn, ke, kiel, ol) paralelajn, ekz. france al sola vorto (*que*); ankaŭ oni malmiksas, *kiu* kun *kia* (fr. quel). *Kies* (sen artikolo) paralelas precize al whose,

(*) Vidu artikolon pri la greka tabelo de S-ro Lloyd, *The British Esperantist*, marto, 1906.

wessen, ĉej, τίνος, kié, kĭmin, (fr. à qui aŭ dont — kun alia larĝa senco).

Angloj kaj germanoj distingas *lia* de *ŝia* (france nur *son*), slavoĵ kaj grekoĵ, krom tio, *lia*, *ĝia*, *ilia* de *sia*. Germanoĵ, slavoĵ kaj ceteraĵ havas apartajn formojn por *min* kaj *al mi* (france, angle *me*).

SINTAKSO.

La sintakso de Esperanto tre similas al tiu de slavaj (aŭ greka) lingvoj. Ĝi estas simpla, logika, natura, libera. Oni preskaŭ ne renkontas, ekz., frazojn kiel « mi bedaŭras ne esti veninta » aŭ « li devas esti vojaĝinta... » Ni vidis jam, ke la uzo de tempoj kaj modoĵ estas logika; nenia troa konjunktivo! Nenia ĝena vortorda regulo.

En lingvoj slavaj, hungara, turka por demandi oni enmetas vorteton kiel la Esperanta *ĉu* (li, czy, ĉi, e, my.) En pola, bohema, slovaka eĉ oni *antaŭmetas* ĝin tute kiel Esperanto (czy on mŭwi? — ĉu li parolas, ĉi ja videl — ĉu mi vidis?) Krom demando — rekta aŭ malrekta (jam germane ĉiam kaj angle kutime oni distingas la malrektan *ĉu* de *se*, dum romane estas sama vorto — si, se) — per tiu vorteto estas montrata ambaŭeco (ekz. ĉu hodiaŭ, ĉu morgaŭ; ĉu li volas, ĉu ne). La demando ne postulas ordoŝanĝon kiel ruse (kion vi volas?)

La uzo de *ne* estas ankaŭ pli konforma al la neromana (precipe germana) uzo (fr. plus qu'il n'en a; rien = io kaj nenio).

Mi certe preterlasas la slavajn uzojn de *en* (en teatro, en Parizo), *el*, *po*, krom, de ordaj nombroj, la francajn *en*, *y*, *venir de*, *que* (c'est mentir que de dire), ktp.

Rimarku fine, ke eĉ la punktuacio kaj la versfarado en Esperanto estas slavo-germanaj.

VORTFARADO.

Mi ankoraŭ ne finis. Sajnas al mi, ke la vortfarado estas la plej grava punkto en la komparo. Tie ankaŭ laŭ la malproksimiĝo for de la romanaj lingvoj, kreskas la interna simileco.

Oni eble miros, se mi diros, ke Esperanto kaj hungara (kaj turka) lingvoj apartenas kvazaŭ al la sama lingvaro, al la

La vortkunmeto estas libera en angla lingvo: oni uzas iafoje vortojn regule kunmetitajn kvankam ne ofte renkontatajn, ekz. bedward (liten), many-kinded (multspeca).

La radikkombino en Esperanto estas ankoraŭ pli germana ol angla, ĉar 1) la radikoj ĉiam unuvortiĝas (paperkorbo — Papierkorb, akvocfalo — Wasserfall, librovendejo — Buchhandlung), kaj la kombinoj estas skribataj sen strekoj (kvarangula, — viereckig, kapdoloro — Kopfschmerzen), 2) ĉar ili havas la saman emon radikŝpari (lumturo — Leuchturm, vaporŝipo — Dampfschiff, memmortigo — Selbstmord). En ambaŭ lingvoj oni povas uzi strekon por ne ripeti la radikon, ekz. en- kaj elporto, Rus- kaj Franclando.

En sama grado la radika kombino apartenas al la slavaj lingvoj (jezikoznanije, zuboleĉebni, odnoetaĵni, svojevremeni), al greka (ἀνθρωπονία — hommortigo, εὐγενής — bonnaskita, πολυδαίδαλος — multnajla), al hungara (gőzhajó — vaporŝipo, kétéves — dujara, hófehér — neĝblanka), al turka (kalemtraŝ — plumtranĉilo, ĥastaĥane — malsandomo).

El tiu ĉi neplena kaj neperfekta revido oni, mi esperas, konvinkiĝas, ke la lingvoj eĉ ŝajnantaj unuavide havi nenion komunan kun Esperanto, trovas en ĝi multe pli da komunaj elementoj ol la romanaj kaj ke en la vico da lingvoj — franca (itala...), angla, germana, rusa, greka, hungara — la konstrua, la interna, lingvokarakterata, meĥanisma, gramatika simileco proksimume *kreskas ju pli malkreskas la vortara*, kaj tiel neniu el ili rajtas plendi, ke ĝi estas ofendita. Esperanto ne pli favoris la romanojn ol la germanojn aŭ rusojn, ĝi estas vere internacia, se oni rigardaŝ de pli larĝa, ne eksterforma vidpunkto.

G. KOLOWRAT.

MIKSAĴOJ

Pia kaj praktika lando. — Antaŭnelonge amema ia Japaino intencante edziniĝi, enpresigis la jenan anoncon en gazeton de Tokio.

« Mi estas bela virino; mia ondolinia hararo ĉirkaŭas min

kiel nubo. Talio mia estas fleksebla kiel saliko. Mia vizaĝo estas dolĉa kaj brila, kiel atlaso el floroj.

« Mi estas sufiĉe riĉa por promeni tra la vivo kun la manoj en la mano de mia karegulo.

« Se mi renkontus ĉarman sinjoron, dolĉan, inteligentan, bone edukitan, mi kuniguŝu je li por la tuta vivo, kaj mi estus kontenta partopreni kun li la ripozon eternan en rozkolora marmora tombo. »

Alphonse Karr havis kiel najbaron, apud sia ĝardeno, riĉan italan grafon, posedantan belegan bibliotekon.

Iam, la verkisto petis sian najbaron ke li pruntedonu unu el siaj libroj.

— Mi tre bedaŭras, respondis la grafo, ke mi ne povas tion fari, ĉar neniam el iaj libroj eliras el mia biblioteko; sed vi povos laŭvole ĝin legi ĉe mi dome; tutan mian bibliotekon hejme mi prezentas al vi.

Post kelka tempo, la grafo bezonis verŝilon, kiun li petis de sia najbaro. Alphonse Karr respondis: Neniam mi lasas eliri el mia ĝardeno, sed se lia grafa moŝto bonvolos veni surverŝi ĉe mi la tutan tagon, li min tre plezurigos.

Malico de ministro. — La ministro de reĝo ĉiumomente renkontiĝis sur la stratoj kun homoj apogantaj sin per bastonoj, kaj dirantaj, ke ili estis vunditaj en la militoj de l'reĝo. Ĉiuj petis pri almozo.

Sed la ministro estis certa, ke iuj el ili ne tute estas kripligitaj, kaj lamas nur, kiam li preterpasas. Tiam, li algluigis sur la muroj de l'palaco skribaĵon dirantan, ke rekompenco estos donacita al ĉiuj soldatoj kripligitaj dum la lasta miito, kaj oni invitis ilin veni la morgaŭan tagon sur la grandan placon.

Ili venis grandanombre, kaj la ministro diris al ili :

« La reĝo, mia estro, estas dankema al ĉiuj, kiuj bone servis lin; sed estas al li neeble, ke li donacu multon al ĉiu. Jen kio estis decidita:

« Mi streĉigis ŝnuron proksime de tie ĉi, je iu alteco. Tiuj el vi, kiuj facile transsupersaltos ĝin, ricevos rekompencan, kiel ili meritas. »

Tuj la kripligitaj eksaltas. Granda nombro el ili lerte transsupersaltis, kaj ĝoje iris enskribigi siajn nomojn.

La ceteraj provis unu post la alia, sed ne sukcesis, kaj ĉiu mokis ilin.

Tiam la ministro tiele parolis al la saltintoj:

« Sinjoroj, mi opinias, ke la reĝo ne estus kontenta, se mi rekompencus, kiel kripligitoj, homojn havantajn tiel bonajn krurojn kiel viaj.

« Rilate al vi, aldonis li, sin turnante al tiuj, kiuj ne sukcesis supertranssalti, vi estas honestaj servistoj; la reĝo donacas al ĉiu el vi po dek oraj moneroj. »

F. SONNIER.

Diversaj notoj, trovitaj en germanaj ĵurnaloj:

Serenaĵo el la laborista sekretariejo estas ankaŭ interesa, kiam en la antŭĉambro eksterlanduloj jam estas instruataj. Laborista sekretario devus vere koni kvin lingvojn. Estas ĝojinde, ke oni trovas ankoraŭ ĉe la organizataj laboristoj tradukantojn. Italá masonisto, hungara presisto, rusa cigarédlaboristo k. t. p. kunhelpas nin fidele, por ĝuste respondi al la demandinto.

6. Beilage zu No. 100 der *Volksstimme*. 1906. 1. Mai.

Privatraĵto internacia. — La priskriboj de la privatraĵto internacia bataladis ĝis nun kontraŭ propraj malfacilaĵoj: ĝis nun ankoraŭ ne ekzistas internacia jurista lingvo. La institucioj propraj al la diversaj naciaj rajtoj estas tiel diversspecaj ke estas preskaŭ ne eble, esprimi ilin per la esprimmaniero de ia fremda rajto. Ĉiu rajto havas ĝian terminaron kaj ĝian idemon-don. Kiaj devas esti la uzanormoj, kiuj laŭ ilia senco devas valori en ĉiuj rajtsistemoj, helpi sin tra tiu neinterkonsento.

Prof. Dr. EUGEN EHRLICH, Berlin: *Deutsche Rundschau*, herausgegeben von Julius Rodenberg; Verlag: Gebr., Paetel. 32. Jahrgang, März 1906. p. 419—433. Heft 6.

Internacia helpa lingvo de kongresoj. — En la Frankfurter Zeitung ni legis raporton de la 15-a internacia internacia medicina kongreso, kiu estis en Lisabono dum la lastaj tagoj de aprilo. Ĉar ni estis ĉiuj, la unuj post kelkaj horoj la aliaj post kelkaj tagoj ekgajninta la konvinkon, ke en tia « Babelo » de lingvo kaj en tia grandega malordo oni ne povas paroli pri efektive scienca rezultato.

HANAUER, *Frankfurt a. M.*

Delikata riproĉo.— Fama naturscienculo bohéma Jan Purkyně estis konata kiel tre afabla viro amanta ŝerci kun la konatoj. Foje irante en universitaton de Praha por fari paroladon, li malfruiĝis preskaŭ je kvarono da horo. En koridoro li renkontis studenton rapidantan lian paroladon. La aŭskultanto kompreneble malfermis la pordon de l'aŭditorio kaj atendis humile ĝis la profesoro eniros. Sed tiu ĉi ankaŭ atendis starante. « Volu eniri, sinjor' profesoro », diris la universitatano. « Mi petas eniru vi », diris Purkyně. « La honoro apartenas al malpli junaj », diris decide la studento. « Vere », respondis Purkyně kun rideto, « sed tamen iru antaŭe, ĉar vi — jam devis esti tie kaj atendi min. »

H. K. B.



ONI INTERPAROLAS:

- Kiel vi trovas lin?
- Lia figuro nekaŝemon elmontras.
- Jes, li ŝajnas malspritulo... kaj malsprita li estas.

MALSAMAJ PROPORCIOJ. — Sekve ia hazardo alvenis homo al ĉiela pordisto Petro, kaj baldaŭ komencis interparolado pri la teraj kaj ĉielaj proporcioj: « Ĉe ni, rakontis Petro, estas tera jarcento nur unu minuto kaj cent milionoj da moneroj nur centono! » « Tiam ne estas malmodesta peto, se mi diras: donacu al mi unu centonon! » « Kun granda plezuro, respondis Petro, sed mi devas peti vin, atendu unu minuton! »

SPRITA RESPONDO. Iam, Episkopo estis manĝanta kune kun kelkaj pastroj, kiam servisto eniris en la manĝoĉambbron kaj diris al sia mastro, ke vilaĝa pastro alvenis por lin viziti.

— Enirigu lin, respondis la episkopo.

Baldaŭ eniras la pastro al kiu la episkopo, forgesante proponi seĝon, diras:

— Nu! mia kara paroĥestro, kio nova en via komunumo?

— Ha! respondas la pastro, mi diros al via Episkopa Moŝto, ke okazis tre kurioza afero: la porkino de mia najbaro havas dektri idojn kaj ŝi havas nur dekdu mamojn.

— Kaj kion do faras la dektria ido? demandis la Episkopo.

— Nu, ĝi faras kiel mi, Via Moŝto: ĝi rigardas la aliajn manĝi.

La pastro estas tuj invitita sidiĝi kune kun la gastoj.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

En Esperanto estas du Lingvoj.

Esperanto havas du ecojn tute rimarkindajn: la logikeco kaj la fleksebleco. Dank' al la unua, ĝi estas la sola lingvo vere logika, kaj sekve nenacia; dank' al la dua, ĝi kontraŭe povas sin alfari tute plene al kiu ajn nacia lingvo, kaj ĝin reprodukti tiel perfekte ke esperanta traduko de ia skribaĵo, ĉu antikva ĉu nuna, estas konsiderinda kiel la fotografaĵo de tiu verko. De tiuj du ecoj devenas do du manieroj tute malsamaj, mi eĉ dirus tute malaj, kiuj prezentiĝas antaŭ esperantisto, kiam li deziras skribi: aŭ li pensas esperante, rekte, senpere de ia Eŭropa lingvo; aŭ kontraŭe li volas konigi al la tuta mondo, per pero de Esperanto, ian verkon jam skribitan en nacia idioma.

Kiam Esperantisto skribas propramove, li devas forgesi ne nur la naciajn lingvojn, kiujn li povas koni, sed eĉ sian patran mem, kaj traduki en sia cerbo ne tian ĉi aŭ tian frazon de Eŭropa idioma, sed nur la ideon, kiun li volas esprimi, la ideon puran, simplan, logikan, senigitan je ĉiu ajn nacia gramatika formo kaj havantan nur la idealan formon de la nenacia kaj universala gramatiko. Esperantisto povas tion fari, dank' al la logikeco de la lingvo, sed nur en Esperanto tio estas ebla.

Sed kiam Esperantisto skribas por traduki tekston jam verkitan en nacia lingvo, la afero fariĝas tute malsimila. Sed antaŭ kiam mi parolos pri la literaturaj fremdaĵoj, mi petas la leganton ke li permesu al mi kelkajn konsiderojn pri la tradukeco, konsiderata laŭ ĝenerala maniero.

Oni povas ordigi la librojn skribitajn de la homaro laŭ du klasoj tute apartigitaj: la sciencaj kaj la literaturaj libroj.

Por la unua, nur la logikeco estas almetebla: ĉar la sciencisto, kiu skribas sciencan verkon, volas esprimi kaj konigi nur sian ideon, la formo, la ordigo de vortoj, la movado de frazoj, kiujn li uzis, estas por li tute flankaj. La temo traktita de li en lia skribaĵo estu bone kaj klare komprenita de la leganto, li estas kontenta; ĉar li trafis sian celon, kaj ne deziras ion plie. Do, por traduki sciencaĵojn, Esperantisto devos uzi la samajn

regulojn ol se li skribus propramove. Li devos bone kompreni la ideon esprimitan de la fremda verkisto kaj ĝin komprenigi al sia legantaro, per pero de Esperanto, kiel eble plej logike, ne zorgante ĉu li reaperigas en sia traduko nacian ordigon da vortoj aŭ specialajn gramatikajn formojn, kiuj estas tute senvaloraj: ĉar en sciencaj skribaĵoj nur la ideo estas grava.

Ne estas same por literaturaĵoj.

Kiam mi legas la tradukon de ia literatura verko, mi faras tion nur ĉar mi ne konas la lingvon en kiu estis skribita la originalo. Se mi konus kaj legus tre akurate tiun lingvon, mi ne bezonus tradukon. Sinjoro de la Palisse ne parolus alimaniere. Do mi petas, mi eĉ petegas de la tradukinto, ke li nur fotografu la tekston fremdan kiel eble plej plene, kaj precipe ke li ne ĝin korektu, pretekstante ke, laŭ lia opinio, troviĝas en tiu verko mallumaĵoj, sensencaĵoj, malspritaĵoj aŭ eĉ malkonvenaĵoj. Se vere tiuj difektaĵoj troviĝas en la fremda skribaĵo, ĉar mi ne povas ilin legi en la teksto mem, pro mia nescio de la lingvo, mi volas almenaŭ ilin retrovi en la traduko: ĉar eble mi konsentos kun la tradukinto, sed eble mi ne konsentos kun li. Eble tia frazo, kiu ŝajnas al li malklara, al mi aperos kontraŭe klarega; eble mi opinios, ke estas tre spritaj la vortoj, kiujn li juĝas malspritaĵoj; eble mi admiros kaj nomos energiaĵoj tre pentraj kaj tre rimarkindaj fortajn esprimojn, kiuj lin ruĝigis, kaj kiujn li ĉaste vualis. Fine, kiam eĉ mi tute konsentus kun li, mi volas fari tiun juĝon laŭ mia propra sento: kaj mi ne akceptas ke tiu juĝo estu altrudita al mi de persono tute nekonita de la verkisto, de persono, al kiu tiu verkisto faris nenian konfidencion, kaj kiun li neniam elektis kiel kunlaboranton.

Ĉar inter la difektaĵoj trovitaj en la fremdaj tekstoj, multaj estas pli ŝajnaj ol realaj, kaj devenas ne de la literaturisto, kiu estis prava skribinte tion kion li verkis, sed de la nescio de la leganto, kiu trovas en la fremda skribaĵo esprimojn rilatantajn kun aferoj, kiujn li ne konas, sekve kies li ne povas kompreni la aludojn; ĉar aŭ ili estas proverboj specialaj al la lando, aŭ ili aludas kredojn aŭ opiniojn, kiuj ne apartenas ĉu al lia epoko ĉu al liaj moroj.

Ekzemple:

Kiam Dido diras al Ilioneo tiujn versojn:

Non obtusa adeo gestamus pectora Pœni;

Nec tam aversus equos Tyria sol jungit ab urbe,

tiamaniere tradukitajn laŭvorte:

Ni Penoj ne portas animojn tiel malspritajn;

Kaj la suno ne jungas ĉevalojn tiel malproksime de urbo
Tirido,

eble la leganto diros: « Kion signifas la dua verso? »

Ĝi signifas:

Kartaganoj ne estas sovaĝuloj.

Ĉar la antikvuloj kredis ke la tero estas ebena; ke la suno veturas sur ĉaro kaj laŭiras sur vojo ĉiam sama, ne vagante norden aŭ suden: do, la popoloj loĝantaj malproksime de tiu vojo ne ricevas sufiĉe da sunlumo kaj restis sovaĝaj.

Nun tiu verso troviĝas tute klarigita: oni tre facile ĝin komprenas. Oni akceptas ke Virgilio ne povis skribi alimaniere, ke li diris neniun sensecaĵon, kaj ke estus kontraŭe malsprita la tradukinto, kiu skribus ekzemple:

Kartago troviĝas en la civiliza terzono.

Ĉar li korektus la opiniojn de antikvuloj, kaj metus en la buŝon de Dido frazon tute malĝustan, kiun la romana poeto ne povis skribi, ĉar li ne konis la veron pri la sfereco de la tero.

Alia ekzemplo.

En la Labiche'a komedio titolita: *La vojaĝo de sinjoro Perrichon*, sinjorino Perrichon, kiu staris senmova dum longa tempo diras:

J'ai les jambes qui me rentrent dans le corps.

Tradukita laŭvorte, tiu frazo liveras:

Mi sentas ke miaj kruroj eniras en mian korpon.

Kaj laŭsence:

Mi estas tre laca.

Nun, kia traduko plej bone taŭgas? ĉu la unua, ĉu la dua?

Ni ekzamenu, kune kun la leganto, tiun tre interesan problemeton.

Kiam iu longatempe laboradis cerbe antaŭ sia skribotablo, li sentas sin tre laca. Lia kapo doloras; liaj ideoj fariĝas konfuzaj, kvazaŭ vualo etendiĝus inter lia cerbo kaj la mondo ekstera. Sed li ne sentas ke liaj kruroj eniras en lian korpon.

Kiam iu marŝadis dum multaj kilometroj, li sentas sin tre

laca. Li malfacile povas sublevi siajn piedojn, kvazaŭ ili estus plumbaĵoj. Sed li ne sentas ke liaj kruroj eniras en lian korpon.

Kiam iu faris trapezajn ekzercojn dum longa tempo, li sentas sin tre laca. Liaj kruraj kaj precipe brakaj artikoj lin multe doloras, kvazaŭ ili estus elartikigitaj. Sed li ne sentas ke liaj kruroj eniras en lian korpon.

Fine kiam iu staris senmova dum unu aŭ du horoj, li sentas sin tre laca. Ĉar la femuraj kaj pelvaj muskoloj, kiuj estas difinitaj al la konservigo de la korpa ekvilibro, estante senripoze streĉitaj, baldaŭ laciĝas kaj rifuzas sian oficon. Tiam li sentas doloran impreson, *kvazaŭ liaj kruroj enirus en lian korpon*.

Do tiu unua traduko, kiu unuavide ŝajnas iom fantazia, troviĝas kontraŭe la sola ĝusta, la sola fiziologia, la sola vere scienca; dum la dua, kiun malatenta observanto opinias pli preciza, fariĝas kontraŭe esprimo tro komuna, tro ĝenerala kaj absolute senigita je precizeco.

Oni povus multigi la ekzemplojn, kaj ĉiam oni alvenus al la sama konkludo, nome: la tradukanto de literaturaj verkoj devas esti ne pentristo sed nur fotografisto.

Do, ĉar Esperanto povas, dank' al sia mirinda fleksebleco, tute modeliĝi al la reliefoj de la lingvo tradukata kaj ilin reaperigi, oni devas utiligi tiun econ, kaj iluziigi la leganton tiamaniere ke li kredas legi la verkon mem en la originala teksto.

Kompreneble mi ne opinias ke oni devas traduki ĉiam laŭvorte. En ĉiuj lingvoj troviĝas naciaj esprimoj specialaj al la lingvo, nomitaj idiotismoj, kiuj ne estas tradukeblaj en aliajn lingvojn: sed krom tiuj gramatikaj malbonaĵoj, kiujn la tradukanto zorge evitos, li devas, laŭ mia opinio, kiam la frazo fremda ne enhavas mallogikaĵojn en sia konstruo, li devas laŭiri la tradukatan tekston kiel eble plej proksime, sekvante la movadon de la frazo, kaj reaperigante ĝian sonoradon kaj ĝian irmanieron, ĉiufoje kiam la afero estas ebla.

Kaj se en la fremda teksto troviĝas nacia esprimo propra al la lando, frazo tre regule konstruita laŭ la gramatiko, sed kies la vera senco estas tute nekomprenebla de alilandanoj, la tradukanto devas ne ilin anstataŭi per alia esprimo, per alia frazo klariganta la sencion kaŝitan, sed kontraŭe li devas ilin traduki tre akurate, kaj forĵeti malsupren de la paĝo, sub formo

de apartigita resendaĵo, la klarigon postulatan de la leganto. Tiamaniere lia traduko restas klara, kvankam ĝi konservas al la teksto tradukita ĝian originalecon. Ĉar kredeble iaj legantoj bezonos tiun klarigon; sed certe multaj aliaj pli lertaj ne bezonos ĝin: kaj Esperantisto, kiu tradukas ian literaturaĵon, ne devas forgesi ke li skribas ne por tiu ĉi aŭ tiu nacio sed por la tuta naciaro, ne por kelkaj specialaj anoj sed por la du mil milionoj da homoj, kiuj vivas sur la tera supraĵo.

Ĉar, laŭ mia opinio, anstataŭ sekigi Esperanton kaj ĝin aliformigi en specon da algebraĵo, oni devus kontraŭe ĝin riĉigi per ĉiuj naciaj esprimoj pli-malpli poeziaj, pli-malpli pentraj, kiuj troviĝas dissemataj tra la tuta lingvaro, por ke la specialaj literaturaj trezoretoj nun apartigitaj en ĉia idioma, nun apartenantaj al tiu ĉi aŭ tiu popolo, fariĝu la trezorego komuna de la tuta homaro.

En la 2-a numero de *Internacia Scienca Revuo* troviĝas tre interesa artikolo de sinjoro Meier, de München; la talenta tradukinto de Wilhelm Tell. Kvankam estante germano, li kritikas la jenan frazon; en kiu troviĝas la adjektivigo de tuta frazo; ĉar tiu formo estas ne internacia sed germana:

Li estis en, de ĉiuj flankoj ombraĵata per arboj, loko.

Kaj li proponas ke oni ĝin anstataŭu per la jena:

Li estis en loko, kiu de ĉiuj flankoj estas ombraĵata per arboj.

Li estas tute prava. Certe ĉiu Esperantisto skribante pro-pramove devas akcepti la duan frazon, kaj tute forĵeti la unuan.

Tamen, ni supozu, ke tiu frazo tradukas la skribaĵon de germana literaturisto pli-malpli fama, tiam, en traduko, *sed nur en traduko*, mi pli amas la unuan formon. Ĉar ĝi pli bone rememorigas la movadon mem de la fremda esprimo kaj pli akurate al mi komprenigas la fizionomion de verko, kiun, pro mia nescieco de la lingvo germana, mi ne povis legi en la originala teksto.

D-RO VALLIENNE.

La trouzado de la kunmetitaj tempoj

Dum la kongreso en Bulonjo S-ro Kabe parolis pri « la Beaufronta skolo de la trouzado de la kunmetitaj tempoj. »

Kio estas tiu-ĉi skolo kaj el kio konsistas tiu trouzado? Ĉu ĝi ne estas himera?

Estus tre dezirinde por pli bona kompreno, ke S-ro Kabe montru iujn difinitan ekzemplojn en ia verko de S-ro Beaufront, en kiuj la kunmetaĵoj povas esti anstataŭigataj per la simplaj formoj sen malprecizigo aŭ difektado de la teksto aŭ stilo.

Ĉu oni povas trouzi iun kunmetitan konjugacian formon tradukante per ĝi fidele tion, kion ĝi akurate esprimas?

Ĉu oni arbitre povas diri « mi skribis » kiam la teksto diras « mi estis skribanta » aŭ « mi estas skribinta? »

Ĉu la kunmetitaj tempoj de la pasivo estas senpezaj, kurantaj, graciaj, kaj tiuj de la aktiva voĉo malbelaj kaj laŭeble evitindaj?

Ĉu estas tute bona « ŝi estis amata » kaj tamen peza, malgracia Beaufrontismo la nuancigo en la aktiva voĉo inter « li estas aminta, li estis amanta, li estis aminta kaj li estos aminta », kiuj kvar kunmetaĵojn povas anstataŭi la simpla formo « li amis. »

Ĉu oni arbitre povas uzi ĝin, se la teksto precize montras unu el tiuj ĉi kvar nuancoj de la indikativo de la estinteco?

Certe ne, kaj tial oni ne povas paroli pri trouzado, sed la afero estas precize demando de ĝusta aŭ neĝusta traduko.

Kompreneble estas permesita kaj tute bona la simpligo per la simplaj formoj, kiam malkompreno ne estas ebla, tiel same kiel oni faras en la naciaj lingvoj. Tamen oni devas gardi sin imiti naciismaĵojn.

Se pro malamo kaj timo de la kunmetitaj tempoj oni

simpligas, ĉar simpligo respondas al ia naciisma kutimo, tio pli akurate meritis esti nomata « trouzado de simplaj tempoj. »

Ni analizu kian rolon la simplaj tempoj ludas kompare kun la kunmetitaj:

Se mi diras « la suno brilas » tio signifas, ke ĝi nun estas brilanta, jam brilis kaj ankoraŭ brilos.

Se pliprecizigo ne estas postulata kaj malkompreniĝo ne estas ebla, « brilas » povas anstataŭi ambaŭ « brilis » kaj « brilos », ĉar la nedifinita estanteco « as » ne nur estas uzebla por elmontri tion, kio nun okazas, sed ankaŭ, kio okazas ofte kaj kutime.

Ekzemple: « Modesteco estas virto », « kanario kantas » k. t. p.

Tia uzo de estanteco estas tute bona kaj ankaŭ praktikata, se oni parolas rakontante (stanteco historia).

Oni trovas tian uzon de la estanteco por rilati al okazintaj aŭ okazontaj faktoj aŭ agoj sennombre en la krestomatio pp. 92—108.

Mi do ĉerpos nur kelkajn specimenojn el la paĝo 93:

« Ankaŭ sen tio ĉi li scias. »

« Ĉiam oni ne vidas la atendatan bordon. »

La scio kaj la vido estis pasintaj faktoj, kiam la rakontisto vivis, ĉar ili okazis en 1492.

« Jen, ĉio estas perdita. » La perdo ne jam estis kaj neniam fariĝis fakto, se oni juĝas, ke ĝi okazos.


Se por la kompreniĝo de tio, kion oni deziras esprimi pli granda precizeco ne estas bezonata, tia uzo de la estanteco por ĉiuj tempoj de la indikativo estas tute logika.

La simpla formo « skribas » povas do anstataŭi je donitaj kondiĉoj « skribis » kaj « skribos. »

Logike povas esti anstataŭigata siaflanke « skribis » nur per « estis skribanta » kaj « estas skribinta » kaj per la du kunmetaĵoj en kiujn tiu ĉi lasta disfalas nome: « estis skribinta » kaj « estos skribinta. »

Same « skribos » povas esti pliprecizigata per « estos skribanta », « estas skribonta » kaj « estos skribonta. »

La indikativo de la aktiva voĉo do prezentas la sekvantan tabelon montrantan, kiel laŭvice la simplaj formoj plipreciziĝas:



Logika konkludo: La kunmetitaj tempoj de la indikativo aktiva estas tempoj tute paralelaj al tiuj de la pasiva voĉo kaj uzeblaj akurate en la sama maniero.

Se ili estas uzataj por esprimi tion, kion ili signifas, tio ne estas kaj logike ne povas esti trouzado.

La indikativo estas modo per kio oni esprimas fakton.

En la franca lingvo la indikativo de la estonteco estas ankaŭ uzata por esprimi intencon, volon aŭ deziron.

Oni diras ekzemple: « Après le diner vous porterez cette lettre à la poste. »

Tio estas franca naciismo, kiu ne devas esti imitata de esperantistoj.

Se esperantisto tradukus: « Post la tagmanĝo vi portos la leteron al la poŝto », tio eble sonos senpeza, kuranta kaj gracia al francoj (aŭ eble ankaŭ al angloj, ĉar ili ankaŭ konfuzas ofte la helpajn verbojn « shall » kaj « will » per kiuj ili formas la indikativon de la estonteco, kun la verboj « shall » kaj

« will », kiam ili signifas « esti ordonata » kaj « deziri, intenci, voli » k .t. p.), sed ĝi grave doloras la orelojn de germano; ĉar « Vi portos tiun ĉi leteron » li tradukos ĝuste en sian lingvon per la estonteca indikativo. « Sie werden den Brief tragen. »

Tio signifas al li: « Mi konstatas la estontan okazaĵon de la leterportado. »

Estas tre strange, ke ankaŭ S-ro Kabe uzas la estontecon tiamaniere.

Li diras ekzemple p. 14 de Pola Antologio:

« *Kion ĝi utilos? Mi ja ne revivigos ilin.* »

Se « revivigos » estas ĝuste tradukata de germano per la indikativo de estonteco:

« Ich werde sie nicht wieder lebendig machen », tio fariĝas absurdaĵo.

Ankaŭ la unua duono de la paĝo 38 de la « Interrompita Kanto » estas tre malfacile komprenebla al germano ne konatiginta kun la kutimo en la franca lingvo.

Sajnas do, ke la fervoro esti en sia stilo senpeza, kuranta, gracia, igas S-ron Kabe trouzi la simplajn tempojn kaj fari senkonscie naciismaĵojn, kies malprecizecon li mem eble ne sentas.

Tial li malprave konkludas, ke aliaj esperantistoj ne sufiĉe uzas la simplajn tempojn.

Lia plendo pri trouzado de la kunmetitaj tempoj laŭ mia opinio ne estas pravigata.

Se oni ĝuste kaj fidele tradukas, oni ne facile uzas la kunmetitajn tempojn malĝuste.

Multe pli danĝera estas la malĝusta uzo kaj trouzo de la simplaj tempoj.

E. Ĉefeĉ.



Bibliografio.

Rememoro pri Solferino, de Henri DUNANT, iniciatinto de la Ruĝa Kruco, unua ricevinto de la premio Nobel'a por la Paco. Esperanta traduko de A. VAILLANT kaj P. FRUIC-TIER. Unu volumo broŝurita, 1 fr. 25 ; luksa eldono, 2 fr. 50.

La fama verko de la Svisa kuracisto prezentas mirinde realan kaj kortuŝan pentraĵon de la tagoj, kiuj sekvis la batalon apud Solferino en la jaro 1859-a. Tiu ĉi libro, jam tradukita en pli ol dudek lingvoj, havis grandegan sukceson en la momento de sia publikiĝo kaj grandaparte elvokis la fondon de la Ruĝa Kruco kaj starigon de la Geneva Interkonsento. La aŭtoro afable aprobis la tradukon esperantan. La tradukintoj, S-roj A. Vaillant (bedaŭrinde mortinta antaŭ la fino de sia laboro) kaj P. Fruictier, estas tre bone konataj de la Esperantistoj, por ke ni ne bezonu laŭdi la ŝilkorektecon de ilia libro. Portreto de Dunant pliriĉigas la enhavon de la verko.

Ruĝa Rido, de LEONID ANDREJEV, kaj **Ili estis frenezaj**, de OCTAVE MIRBEAU. Esperantaj tradukoj de F. AVILOV kaj L. SEGRÉTINAT. Unu volumo broŝurita, 1 fr. 50 ; luksa eldono : 3 fr.

Du famaj literaturistoj, unu rusa, la alia franca, afable permesis, ke oni esperantigu la suprenomitajn rakontojn, en kiu ili prezentas mallajan pejzaĝon de la ruso-japana milito. La tradukintoj klopodis por kiel eble plej precize traduki la naciaĵojn kaj stillertaĵojn de la originalaj verkoj, restante tamen kompreneblaj al internacia publiko. Ambaŭ rakontoj, tiel metitaj unu apud la alia, plenigas kaj valorigas sin reciproke.

La lasta Abenceraĝo, de CHATEAUBRIAND. Esperanta traduko de RENÉ DESHAYS. Unu broŝuro, 0 fr. 50.

La kortuŝaj aventuroj de la lasta Abenceraĝo, vizitanta sian naskolandon, el kiu estas ekzilitaj liaj prapatroj, kun la intenco venĝi ilin kaj mortigi unu el iliaj posteuloj. Sed li renkontas junulinon, kun kiu li enamiĝas, kaj li forgesas provizore sian intencon. Post longaj suferoj kaŭzitaĵoj de la malsameco de religio, li decidiĝas kristaniĝi por edziĝi kun sia amatino, kiam li ekscias, ke tiu ĉi estas precize la filino de tiuj persekutintoj kiujn li volis unue mortigi. Venkita de la doloro, li reiras al la dezerto... La lerta traduko de S-ro Deshays donos certe al la nefrancoj bonan ideon pri la ĉarmo de tiu klasika franca libro.

Du Rakontoj, originale verkitaj en la lingvo Esperanto, de D. DE ROTHAU. Unu volumo broŝurita, 1 fr.

La unua el tiuj interesantaj noveloj rakontas la aman

aventuron de du junuloj kontraŭvole konatigitaj de maljuma komuna parencino, kaj kiuj forgesas en fina edziĝo la malpacajojn okazintajn inter Esperantistoj en somerloĝejo pri diversaj gramatikaj kaj stilaj demandoj. Tiu ĉi lasta amuze pentras la ĝeneralan fizionomion de niaj esperantistaj kunvenoj samtempe estas interesanta klarigo de kelkaj punktoj de nia lingvo.

La pseŭdonima aŭtoro de tiuj rakontoj estas lerta propagandisto, kiu por la unua fojo eldonis esperantan libron: ni povas lin gratuli por tiu komenco, sincere dezirante, ke li baldaŭ elnasku denovajn tiajn verkojn.

Kverko kaj Floro, de AMICIS, tradukita de S-ino ROSA JUNCK. Unu volumo broŝurita, kun du portretoj, 1 fr. 50.

Kortuŝanta novelo de la fama itala aŭtoro, verkita okaze de la kalabra katastrofo, estas elegante tradukita en Esperanto, kun la afabla permeso de S-ro de Amicis, de S-ino Rosa Junck, kiun bone konas ĉiuj Esperantistoj estintaj en Boulogne kaj Genève. La libro krom tio entenas multajn artikolojn, spritaĵojn kaj versaĵojn, verkitajn angle, france, germane, itale, kaj Esperante, de nia simpata samideanino, kaj la portretojn de la itala literaturisto de lia tradukintino.

La Gasto, duakta komedieto, originale verkita de S-ino M. VALLIENNE. Unu broŝuro, 50 centimoj.

Unu el niaj plej fervoraj parizaj Esperantistinoj, edzino de D-ro Vallienne, la fama tradukinto de Virgilio, ĵus verkis tiun amuzantan salonan komedieton, kiu estos sendube favore akceptata de la grupoj Esperantistaj por siaj festoj, ĉar ili povos ĝin ludi sen multe da teatraj ornamaĵoj kaj per 5 personoj. La dialogo estas facila, gaja, aŭdebla de ĉiuj oreloj, kaj ni povas nur gratuli la aŭtorinon por ŝia prospera sukceso en la salona komedio.

Por kaj kontraŭ Esperanto, dialogo de D-ro VALLIENNE, esperanta eldono, 30 centimoj; franca eldono, 15 centimoj.

Skribita sub formo de dialogo, je fâcillegebla kaj sprita maniero, tiu ĉi broŝureto tre fundamente traktas la argumentojn ordinarajn faratajn por kaj kontraŭ la lingvo internacia artefarita. Senutile estas diri, ke la konkludo celas al akceptigo de Esperanto. La nova verko de D-ro Vallienne estas bona propagandilo, kies esperantan tekston ni eldonis por ebligi al ĉiuj Esperantistoj ĝin traduki en sian nacian lingvon, ĉar ĝi traktas la demandon je tute ĝenerala maniero. La franca eldono kompreneble celas la neesperantistojn; por faciligi ĝian disdonadon al niaj amikoj, ni presigis ĝin en malpli luksa formo ol la esperantan, kaj difinis sekve por ĝi malpli altan

koston : 15 centimoj por unu ekzemplero, 10 frankoj por cent ekzempleroj. Estas esperinda, ke baldaŭ alilingvaj tradukoj presigos.

La Puto kaj la Pendolo, de EDGARD ALLAN POE, tradukita de ALEX. PRIDE. Unu broŝuro, 30 centimoj.

Jen estas unu el la ĉefverkoj de la fama amerika aŭtoro, kies fantazieco estas admirata en ĉiuj landoj. La teruraj turmentoj suferataj de malliberulo en la inkviziciaj maliberejoj estas tie majstre pentritaj. La tradukinto donis al ni agrablan tekston Esperantan, facilegeblan kaj klaran, kvankam li en multe da lokoj konservis la apartan stilon de la originala teksto. En nia biblioteko ĝis nun mankis verkoj el la amerika literaturo: tiu ĉi manko feliĉe ekmalaperis, dank'al S-ro Pride, kiun ni ne povas tro gratuli por lia ŝatinda ideo.

L'Esperanto, sa structure, ses raisons d'être, de L. DE BEAUFONT, prezidanto de la franca Societo p.p. Esperanto. Unu broŝuro 74 paĝa, 15 centimoj 100 ekzempleroj por 10 frankoj.

Tiu ĉi broŝuro estas reeldono sub nova titolo kaj formo de la konata libreto 122, kiu varbis al Esperanto la plej multon el ĝiaj nunaj francaj propagandistoj. Tio ĉi senutiligas longan laŭdadon de la verko. La nova eldono estas tute refandita kaj konformigita je la nuna stato de nia afero. Multaj modeloj, klarigoj pri la mekanismo de nia lingvo kaj vortareto faras ĝin tre praktika (kaj malkara) propagandilo.

Esperanto et Croix-Rouge, de leŭtenanto BAYOL, instruito ĉe la speciala oficiro Lernejò, en St-Cyr. Unu volumo 160 paĝa, 1 fr.

Tiu libro estas unu el niaj plej bonaj propagandiloj. Verkita por la oficiroj, la kuracistoj kaj Ruĝa-Krucanaro, ĝi tamen estas konvinka kaj alloga por la ceteraj legantoj, pro siaj multaj dokumentoj nontrantaj la absolutan necesecon de lingvo internacia, la taŭgecon de Esperanto, ktp. Kurso de Esperanto, terminaro kaj frazaro por oficiroj, kuracistoj, flegistoj, inĝenieroj, maristoj, k. a., esperanto-franca vortaro kaj diversaj praktikaj informoj tre utile plenigas tiun lernolibron, kies aŭtoron ni plej varme gratulas por lia bonega ideo. La verko estas jam tradukata en diversajn lingvojn, kaj ĝia aŭtoro estas komisiita de la franca milita ministro por prezenti raporton pri la utileco enkonduki Esperanton en la Ruĝa-Krucanaron.

Lexique des notions et du Bildaro, de S-ino SERVIN, 0 fr. 25.

Tiu ĉi kajereto estas la lasta el la serio komencita per *Premières Notions d'Esperanto*; ĝi entenas plenan vortaron

de ĉiuj vortoj uzataj en la bonega kurso verkita de S-ro Th. Cart.

Cours complet d'Esperanto, de Th. CART. Unu volumo, kun 26 bildoj nigraj kaj diverskoloraj, 1 fr.

Tiu ĉi nova verko de la fama aŭtoro de Esperanto en dek Lecionoj, estas farita por tiuj, kiuj neniam bone sciis aŭ forgesis la gramatikon kaj preferas lerni Esperanton per praktikaj ekzercoj kaj buŝa uzado pli ol per gramatikaj reguloj; alivorte dirite, ĝi estas kombinita laŭ la moderna instrumentodo de la lingvoj. 26 diverskoloraj bildoj kaj vortaro 2000-vorta faras ĝin tute aparta kaj plena lernolibro. La libro estas konsistigita per la diversaj kajeroj 25-centimaj *Premières Notions d'Esperanto, Bildaro, Commentaire et Questionnaire*, kaj *Lexique des Nations et du Bildaro*. Tiamaniere oni povas laŭvole aĉeti ĉion en unu fojo aŭ kontraŭe pagi pokajere, laŭ tio se oni estas riĉa aŭ ne, kio certe faciligos la propagandon.

—pdl—

Pri « Panroman »

En la 3-a n-ro de « L. I. », mi verkis artikoleon pri falsaj komparoj inter *Esperanto* kaj *Dilpok*-nova lingvo internacia elpensita de S-ro Marchand.

La sama « metodo » estas praktikata en propaganda folieto de alia novenakista lingvo, kies « patro » S-ro Moleenaar triumfe komparigas la jenajn fragmentojn

ESPERANTO

La rilatoj inter la homoj de la diversaj nacioj ne estas facilaj.

La januara kajero de la revuo « *Tra la Mondo* » donas portretojn de la eminentuloj ricevintaj la Nobelajn premiojn, de la norvegaj gregoj, de kelkaj konataj esperantistoj kaj originalajn artikolojn senditajn de diversaj landoj.

PANROMAN

Relazioni inter homi de divers nazioni non es facil.

Januar-numer de revü « *Tra la Mondo* » don portreti de laŭreati de Nobel-prez, de norvegian suveräni, de plur eminent esperantisti e original artikli de divers paesi.

Nia samideano, S-ro Ŝ., montrante al mi la folieton, rimarkigis, ke la Panromana modelo estas pli mallonga kaj ĝenerale pli simpla kaj facila ol la Esperanta. La laborema S-ro Ŝ., eĉ elkalkulis, ke la Esperanta specimeno enhavas 241 literojn, dum tiu de Panroman nur 175. Tre elokventa argumento!

Mi komparis la tradukon kaj la originalon, mi komparis kaj laŭte frapis tablon per la pugno, ĉar mi sentis ekstreman indignon : la traduko estas tre malpreciza. Mi tuj esperantigis la tradukan specimenon de Panroman kaj ricevis la jenon :

« Rilatoj¹ inter homoj de diversaj nacioj ne estas facilaj.

*Januar-numero*² de revuo « *Tra la Mondo* » donas portretojn de *laŭreatoj*³ de Nobel-premio, de norvegaj *suverenoj*⁴ de kelkaj eminentaj esperantistoj kaj originalajn artikolojn de diversaj landoj. »

Mi atentigas la legantojn, ke, krom tio, kelkaj la plej malfacile kompreneblaj vortoj de l'Esperanta teksto, nome « ricevintaj », kaj « senditajn » estas ne tradukitaj en la Panromana teksto.

Nu, ŝajnas al mi, ke pluaj komentarioj estas superfluj!

BORISO KOTZIN.

P.-S.— Pri « Panroman » ĝenerale mi, espereble, ankoraŭ parolos en «L. I. ».

PROJEKTO

pri la fonda de : « Tutmonda Ligo de Instruistoj por propagando de Esperando inter junuloj kaj infanoj, precipe inter la gelernantaro tutmonda ».

« *Varbi maljunulojn estas vane labori, ĉar ili ĉiuj baldaŭ mortos kaj estos perditaj por nia afero (ridoj). Sed ni devas labori en la radikoj kaj varbi tiujn, kiuj morgaŭ estos siavice plenaĝuloj kaj havos infanojn, kiujn ili instruos pri esperanto.* »

El parolo de S-ro E. Privat dum la unua kongreso esperantista.

« *Propagandi nur inter la plenaĝuloj estas kvaŭzaŭ klopodi por plenigi la barelon de la Danaidoj.* »

El parolado de S-ro E. Boirac dum la unua kongreso esperantista.

Kiu provis disvastigi esperanton inter junuloj kaj infanoj, tiu sendube povis rimarki, ke la laboro en tiu ĉi rilato iras dek-

(¹) Panroman ne havas artikolon « *la* », sed nur la malon « *un* »; ĉar en la fragmento la « *un* » ĝuste nenie estas renkontata, mi rajtis ne uzi en la Esperanto la artikolon. — (²) La falsaj vortoj estas kursive presitaj. — (³) V. la vortaron de Möller u. Borel. — (⁴) Samen.

foje pli facile, ol inter la plenaĝuloj. El miaj lernejoj jaroj restis en mia memoro, ke mi kaj multaj el mia kolegoj provis krei ian artefaritan lingvon; mi supozas, ke tiu-ĉi penado estas tiel komuna preskaŭ al ĉiuj lernantaj infanoj, ke oni povus ĝin juĝi kvazaŭ instinkton enradikiĝintan en la animo kune kun la naskiĝo, kvazaŭ antaŭsenton de estonta komuna artefarita internacia lingvo por la tuta homaro.

Kiam vi volas esperantigi plenaĝulojn, vi devas antaŭe sterki la teron elvokante intereson al la ideo de internacia lingvo, montranta la uzeblecon kaj facilecon de esperanto; poste, ĵetinte la semon, vi devas ĉiam zorgi, ke la tero ne sekigu, ke la malforta kreskaĵeto ne pereu, ĉar la plenaĝuloj ofte, aprobinte la ideon, tre maldiligente lernas nian lingvon kaj baldaŭ malvarmiĝas. Kontraŭe, se vi volas disvastigi esperanton inter junuloj kaj infanoj, vi trovas teron fruktodoneman, vi do devas nur bone ĵeti la semon kaj forta kreskaĵo baldaŭ leviĝos, ĉar la tero neniam sekigu, surverŝadata per diligenteco kaj fervoreco de la juna lernantaro. La kreskaĵo baldaŭ donos fruktojn; ĝi malavare disĵetos semojn sur la fruktodonan teron kaj la disvastigo daŭros sen ia klopodo de via flanko — vi devos nur gvidi la junajn batalantojn.

Pri ĉio supredirita ne mi la unua atentigas esperantistojn, ĉar dum la unua kongreso esperantista sinjoroj E. Privat kaj E. Boirac bonege parolis pri tiu sama temo. Mia provo propagandi esperanton en Enisejsk nur konstatigis iliajn vortojn, ĉar la disvastigo de esperanto en nia urbo inter la plenaĝuloj estas preskaŭ nebla pro la indiferenco kaj skeptikeco de miaj samurbanoj; eĉ se ili aprobas, ili tamen ĉiam « *ne havas tempon por la lernado.* » Vidinte, ke mia laborado inter plenaĝuloj ne donas fruktojn, mi provis interesigi por esperanto lernantojn de la gimnazio, kies inspektoro kaj instruisto mi estas. La sukceso estis mirinda. Multaj junuloj flamiĝis kaj, apenaŭ pasis ses monatoj, kelkaj el ili fariĝis jam tiel spertaj esperantistoj, ke ili nun preskaŭ ne bezonas uzi la vortaron por legi la esperantan literaturon. Mi fondis por ili esperantan bibliotekon, kiu kredible baldaŭ enhavos la tutan esperantan literaturon; abonante la gazetojn « Tra la Mondo », « Juna Esperantisto », kaj « Rusaŝlanda Esperantisto » en du ekzempleroj mi transdonas po unu ekzemplero de tiuj-ĉi gazetoj en la ĵus nomitan bibliotekon espe-

rantan de miaj lernantoj. Krom tio unu juna lernanto ricevas mem « Lingvo Internacia », alia « Juna Esperantisto ». Nun miaj lernantoj fervore korespondas kun esperantistoj en diversaj landoj. Tre amikecajn interilatojn ili havas kun lernantoj de sinjoro Mariano Plana, instruisto el Hispanujo (Tolosa, [Guipuzcóa] Escuelas Pias, España) kaj kun sinjoro H. J. Bulthuis, konata esperantisto el ŝ. Gravenhage (Haag, [Fronemanstr. 6]), Hollando.

Tiuj-ĉi rilatoj konvinkis min pri la neceseco fondi tutmondan ligon de instruistoj por la propagando de esperanto inter instruistoj kaj lernantoj, junuloj kaj infanoj. Mi dissendis jam alvokon pri la fondo de la ligo al esperantaj grupoj, gazetoj kaj al kelkaj esperantistoj. Nun mi volas diri kelkajn vortojn pri la taskoj kaj celoj de nomita ligo, kiel mi ilin komprenas:

1) *Organizado de propagando inter geïnstruistoj.*

Oni povas facile kompreni ke la varbo de unu instruisto al nia afero signifas samtempe esperantigon de la lernantaro de tiu lernejo, en kiu li instruas. Kiel rimedon por tiu-ĉi celo mi proponas dissendi alvokon en esperanto kun aldono de ŝlosilo « Ĉefeĉ » kaj kun traduko en la nacian lingvon al instruistoj kaj estroj de diversaj lernejoj en la mondo. La alvoko devas esti skribita je l'onomo de la ligo kaj enhavi: historion de esperanto, nunan staton de ĝia disvastiĝo kaj signifon de internacia lingvo por la homaro, precipe por instruistoj, lernantoj kaj por la lerneja afero, la regularon de la ligo, finante per invito aliĝi al la ligo. Krom tio la alvoko estos dissendota al ĉiuj esperantaj gazetoj, esperantaj grupoj, agemaj esperantistoj, al ĉefaj grandaj gazetoj kaj ĵurnaloj en la mondo kun la peto varbi adeptojn al la ligo.

2) *Organizado de propagando inter gejunularo lernanta.*

La aktivaj membroj de la ligo prenos sur sin la propagandon en ilia urbo inter la administrantaro de lernejoj kaj inter la instruistaro. Ĉiu lando povus havi apartan komitaton rajtigitan de la centra komitato de la ligo por la propagando. Se oni ne povas oficiale enkonduki esperanton en la lernejojn de ia urbo, oni klopodu por la permeso fari privatajn nedevegajn kursojn en ili; se tio-ĉi ne estas ebla, oni penu esperantigi instruistojn kaj disajn lernantojn.

Unu el plej efikaj rimedoj por propagandi esperanton inter junuloj kaj infanoj estas la internacia korespondado. Ilustrita poŝtkarto alveninta el fremdlando ofte ne povas interesigi plenaĝulon, ĉar li estas tro « serioza » por sin interesigi je « tia bagatelo », sed la junuloj kaj infanoj havas ĉiam grandan plezuron ricevante leterojn kaj poŝtkartojn ilustritajn de kolegoj samagaj en la tuta mondo.

Ofte post la alveno de tia letero aŭ poŝtkarto al iu el lernantoj novaj junaj adeptoj aliĝas kaj komencas fervore lernadi la internacian lingvon. Oni ne devas forgesi ke la infanoj ne havas la naciajn antaŭjuĝojn kontraŭ la alilanduloj, tiel oftaj kaj fortaj ĉe la plenaĝuloj, tial la internacia alproksimiĝo havas tute apartan ĉarmon por ili — kosmopolitoj en esenco de ilia juna, nedefektita per la vivo animo. Ĉiu instruisto povas tiel gvidi la internacian korespondadon de siaj lernantoj, ke ĝi helpos al ili la lernadon de diversaj sciencoj, precipe de geografio, historio, antropologio kaj natursciencoj. Ĉar inter la instruistoj kaj lernantoj preskaŭ ĉiam troviĝas fotografantoj-nemetiistoj, mi tre rekomendas fari interŝanĝon de fotografiaĵoj de instruistoj kun iliaj lernantoj-esperantistoj, de lernejoj, klasoj, kabinetoj, vidaĵoj de sia urbo, de naciaj kostumoj, festoj k. t. p. En kelkaj okazoj la interŝanĝo de natursciencaj kolektoj povus doni tre malkaran rimedon pliriĉigi la lernejajn kabinetojn kaj muzeojn. Oni ankaŭ konsilu al la lernantoj krom la korespondado kun esperantistoj skribi leterojn ankaŭ al alilanduloj ankoraŭ neesperantigitaj kun aldono de ŝlosilo « Cefeĉ » en ilia nacia lingvo, rekomendante al ili en ĉi-tiuj leteroj aliĝi al esperanto; la adresojn de diversaj lernantoj kaj instruistoj-neesperantistoj oni povas ĉiam havigi de siaj korespondantoj. Krom la organizado de la suprenomitaj interrilatoj la ligo devas zorgi pri la enkonduko de esperanta fako en la ĵurnaloj por junuloj kaj por infanoj. Sajnas al mi, ke oni tre malofte enpresas artikolojn pri esperanto en ĉi-tiuj ĵurnaloj.

Romano FRENKEL.

(Daŭrigota.)

Presejo de la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

Administrantaro : Th. Cart, prezidanto ; Paul Fruictier, delegito ;

Pro Benoit, Dr^o Vallienne, membroj.

Sekretario de l'adm. : V. Chaussegros. — Teknika direktoro : Lengyel Pál.

L'Imprimeur-gérant : P. Fruictier

